

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 512

JUNIO 1948



Jam internacie fama detektivo de fikcio

DETEKTIV-INSPEKTORO FRENCH

de Scotland Yard

faras sian debuton al la Esperanta publiko

en la nova verko de FREEMAN WILLS CROFTS

MORTO DE TRAJNO

Tradukita de MASON STUTTARD

Kiu igis La Trajnon morti? Kial La Trajno mortis?

La respondoj troviĝas en ĉi tiu intereskapta mistero de la fervojo.

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, afranko 6p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

ANONCETOJ

Kosto : du pecnoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council. Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Brita oficiro serĉas postenon en Japanujo. Parolas hindustanan, germanan, kaj francan lingvojn. Korespondas hispane, itale. Stenografias angle. Leŭt. A. J. Cameron, National Bank of Scotland, Inverness, Skotlando.

Fr. Svanĉina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj: (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Don Kihoto de la Manĉo, literatura ĉefverko hispana, aĉete dezirata en ĉiuspecaj eldonoj fremdlingvaj, ankaŭ en Esperantaj fragmentoj. Ofertoj al UEA-Peranto, D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

Franz Heidler, (16) Kleinkrotzenburg, Hauptstrasse 49, Amerika Zono, Germanujo, deziras interŝanĝi p.m. kun seriozaj pm-kolektantoj en ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Libro por korespondemuloj senpage. Informoj kontraŭ poŝtrespondkupono. Cerri, Esperanto-servo, Postal casella 89, Varese, Italujo.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Poŝtmarkojn mi volonte interŝanĝos kun ĉiulandaj Esperantistoj. Respondo garantiata. Oswaldo Leite de Moraes, Delegito de UEA, Rua Libero Badaró, 39-6 and., São Paulo, Brazilo.

Poŝtmarkojn argentinajn kaj sudamerikajn interŝanĝas kontraŭ tiujn de via lando, kvanto kontraŭ kvanto, Adolfo Basualdo, Uriarte 2443, Buenos Aires, Argentino.

Tri Esperantistoj korespondos tutmonde (afranku filatele): Louis Bozier, Yoreix, Le Donzeil (Creuse), Francujo.

Samideanoj tutmondaj. Kiu povas kaj volas helpi per laborkontrakto al du honestaj, junaj, inteligentaj, konsciencaj kaj perfekte fremdlingve parolantaj (esperante, angle, hispane, germane, france, ruse, kaj latve) Latvaj Esperantistoj, kiuj havas praktikon ankaŭ en industrio, komercaj aferoj, kaj drogaĵo. Intenco elmigri. Bonvolu skribu al S-ino Zenta Vinks, Haus Rose, Böntalstr. 7., (20b) Holzminden, Brita Zono, Germanujo.

Deziras korespondi esperante aŭ angle kun alilandaj membroj de la societo "Ronda Tablo"; certe respondos; S-ro S. Fox, Heath School House, Halifax, Yorks., Anglujo.

Kolektantoj atentu! Se vi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn aŭ aliajn objektojn aliĝu al la klubo "Nordia". Per sia organo "Nordia News" ĝi peras kontakton inter ĉiulandaj kolektantoj. Petu aliĝilon ĉe la peranto O. Juhlin, Hambergsund, Svedujo.

Gefianĉiĝis 20an Junio 1948 Yung-Sen Yang, Chungking, Ĉinujo kun Maria Lantsoght, Brugge, Belgujo.

René Favre, 3 rue Bellevue, Angoulême, Francujo deziras korespondi kun Usono, Anglujo, Italujo.

Bele frankitajn kovertojn kolektas Rudolf Tuma, Skroupova 28, Chomutov, Ĉeĥoslovakujo.

Filatelistoj el ĉiuj landoj! Ĉu vi estas fervoraj kolektantoj? Bonvolu peti informojn pri Madeira Filatela Klubo. Skribu multnombro al prez: D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube 49, Funchal, Madejro.

Deziras korespondi kun mondaj samideanoj pri la temo Esperantomovado en via lando 31-jarulo. Respondo estos akurata. S-ro P. T. Seo, Korea Esperanto-Instituto, Ulgi Ro, Ka., No. 199, Seoul, Koreo.

Lernanto de Esperanto deziras korespondi tutmonde. S-ro Tom Thompson, Ohakune, Nov-Zelando.

Svedoj, Norvegoj, Finnlandanoj, Belga profesoro studvojaĝante viajn landojn (Julio, Aŭgusto) prelegos aŭ aranĝos amuzan vesperon senkoste: Kosmopolit, Konijnenperken 107, Bosvoorde, Brussel, Belgujo.

Eksporto de vinberoj. Informo: Vinbercentralo, Garennes 107, Boitsfort, Brussel, Belgujo.

Pola skolto (18-jara) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Czuba Zdzislaw, Rynek Kilinskiego 18, Lowicz, Polujo.

Lisboa. Dum Septembro mi partoprenos al la Internacia Geografia Kongreso kaj ŝatus renkonti samideanojn. Prof. Elio Migliorini, Istituto Universitario Orientale, Napoli, Italujo.

MALAPERIS

ACKERMAN, Laurence George (Angla)

Naskiĝis : 28-1-1924

Profesio : ŝipa kuiristo

Alta : 1.73 metrojn

Pezo : 63-66 kilogramojn ; svelta.

Vizaĝo : flavethaŭta, tutrazita.

Okuloj : brunaj.

Dentoj : bonaj ; mankas tri malantaŭaj.

Haroj : mezbrunaj, maldensaj supre.

Cikatroj : malantaŭ dekstra orelo (mastojda),
sub maldekstra okulo,
supra lipo (neklara),
dekstra maleolo, severa,
tendenco lameti.

Kiam lastfoje vidita portis R.A.F. oficiran pluvmantelon, zonitan, brunan feltĉapelon, grizbluan lanŝtofan duoblantaŭajan jakon kaj pantolonon, blankan ĉemizon, oran sigelrington maldekstramane.

Malaperis 00.30 horojn 25-11-47 de kafejo 24 Metaalstraat, Antverpeno, Belgujo. Menciis kontaktojn en Prago, Ĉeĥoslovakujo. Parolas nur angle.

Informon petas W. H. Coventry, 24 Purbrock Avenue, Watford, Anglujo.

ESPERANTA LEGOLIBRO

VILHO SETÄLÄ

Bindita 112 paĝoj

Prezo 2 ŝil. 6p., afranko 4p. (11 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Junio 1948
N-ro 512 (6)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo	-	£5 anglaj
$\frac{1}{2}$ paĝo	-	50 ŝil. anglaj
$\frac{1}{4}$ paĝo	-	25 ŝil. anglaj
$\frac{1}{8}$ paĝo	-	12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

SINLIMIGO

Utilas de tempo al tempo atentigi la Esperantistaron pri la esenco kaj celo de nia movado. Diversaj dokumentoj de la Esperantismo trafe priskribas ambaŭ, inter ili la fama *Deklaracio de Bulonjo*, la traktato *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*, kaj speciale la *Antaŭparolo* de la *Fundamento de Esperanto*.

Ĉi tiuj dokumentoj de la Esperantismo estis verkitaj antaŭ duonjarcento. Le ĉefaj ideoj ne perdis valoron malgraŭ ŝanĝitaj cirkonstancoj. Montriĝis tamen, ke nia oficiala sinteno, kies gvidlinio estas sendependeco je politikaj problemoj kaj la neŭtraleco pri mondrilataj demandoj, devas barakti kontraŭ diversaj fluoj kaj tendencoj, fremdaj al ĝi.

Ne malmultaj samideanoj (kaj bonaj !) sincere opinias, ke nia movado devus partopreni en demandoj kaj problemoj politikaj ; aliaj opinias, ke ni devus esprimi nin nete pri reformoj de certa gravo—ni diru ekzemple pri la plej bona maniero sekurigi la pacon. Ni ja ĉiuj senescepte estas por la paco, la vera paco, sed ne tiu stato de *nemilito* en kiu ni nun vivas. Ni tamen ne povas partopreni en la batalado por la sekurigo de la paco, problemo vasta kaj komplika. Alia demando estas la organizo de la mondo, aŭ pli urĝe la Eŭropa Konfederacio, pri kies efektivigo praktika disiras ankaŭ ideoj. Simpatianta kun la fincelo, ni devas resti ekster la diskutoj. Tio neniel malhelpas, ke anoj de tia movado kiuj troviĝas inter ni, laboru por ambaŭ reciproke, por internacia lingvo kaj Federalismo.

La konkludo estas, ke ni limigu nin al nia propra celo. Nia laborkampo estas tiom vasta, tiom riĉa je eblecoj, ke ni severe evitu malŝparon de tempo kaj energio. La sukceso de grandaj ideoj dependas de multaj faktoroj. Unu el ili estas la ekskluziveco de la celdirekto. Nia celo estas la ĝenerala uzado de la internacia lingvo en intergentaj rilatoj. Al ĉi tiu celo devas subordiĝi ĉio alia. Ni ne perdiĝu en flankaj aferoj, ni limigu nin al tio, kio estas nia origina tasko. Al la neŭtraleco de nia movado ni aldonu plian fundamentan regulon—la sinlimigon je nia propra afero.

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

ARGENTINO

La *Nacia Popola Universitato* de Rosario starigis kurson de Esperanto kiel en la pasinta kaj antaŭpasinta jaroj. Tiuj kursoj montriĝis tre sukcesaj kaj la Direktoro (Universidad Popular de Rosario, str. Santa Fe 2085, ROSARIO) meritas gratulon pro sia praktika apogo al nia afero.

La klubo en Rosario sukcesis loki afiŝojn ĉe la haveno per kiuj maristoj kaj aliaj estas invitataj, en Esperanta kaj hispana lingvoj, ĉeesti la klubon.

FRANCUJO

La Touring Club de France, kiu dekomence subtenis nian movadon, denove aranĝis kursojn de nia lingvo, kiuj okazas ĉiumarde kaj ĉiuven-drede en la ejo de TCF, 65 Avenue de la Grande Armée, Parizo, ĉambro Deffert. La kursoj estas gvidataj de samideano André Strobel laŭ la Ĉe-metodo.

La poŝtoŝtupoj de Fécamp en Normandio, kie okazis la Franca Kongreso de Esperanto, stampigis jam de Aprilo la sendaĵojn kun propa-ganda poŝta stampo.

GERMANUJO

Esperanto en la Sovetia zono

En Dresden okazis kunveno de la Dresdenaj samideanoj la 11-an de Aprilo. Ĉeestis ĉirkaŭ 250 personoj. La kunsidojn prezidis S-ro Wachsmuth. S-ano Knoll deklamis poemon de li verkita kun titolo *Nova Espero* (Vidu paĝon 75). La prezidanto raportis pri klopodoj de la estraro por forigi la malpermeson, kiu daŭris unu jaron, rilate la uzon de Esperanto. La kunveno estis konkreta atesto pri la forigo de la malpermeso. Poste okazis vigla diskuto pri farota laboro kaj oni elektis komisionon por ekzameni la proponojn kaj kunordigi laborprogramon.

K.K.

En München okazis la 28-an de Aprilo ĝis fino de Majo gazetara ekspozicio. Inter la multaj standoj troviĝis rimarkinda Esperanto-stando aranĝita de la redakcio de *La Ponto*, germana Esperanto-gazeto.

ITALUJO

Komisio de la Itala Esperanta Federacio ni intencas organizi nacian kongreson en Torino, verŝajne de la 19-a ĝis 21-a de Septembro 1948. La programo poste estos difinata kun detaloj, sed verŝajne enhavos interkonatiĝan vesperon, ekskurson kaj teatraĵon krom la kunsidoj de la italaj Esperantistoj.

Tial ke jam anoncis sian partoprenon kelkaj gravaj neesperantistaj organizaĵoj kaj ĉar la kongreso okazos en la kadro de la centjara jubileo de itala lukto por sendependeco estus bone se pluraj eksterlandanoj partoprenus la kongreson. La adreso de la Kongresa Komitato estas: Ing. E. Aproso, via Morghen 34, TORINO.

*D-ino C. Conterno Guglielmetti,
Prez. de K.K.*

JAPANUJO

En sia klopodo restarigi la movadon en Japanujo, la Japana Esperanto-Instituto sendis cirkulerojn en 1945 al 646 samideanoj, kun kiuj oni antaŭe havis rilatojn. El tiu nombro 200 respondis, sed en 1946 oni havis kontakton kun 1251 membroj. En 1947 la ekonomia situacio iom pliboniĝis kaj la oficiala organo povis aperi ĉiumonate je 24 paĝoj, kun preskvanto 3000. La 35-a Kongreso okazis en Tokio en julio tiujare, kaj la 36-a okazos en Osaka.

Nun ekzistas 50 lokaj grupoj kaj en 1947 oni organizis 76 kursojn kun partopreno de 1228 personoj.

En legolibro de japana lingvo, uzata en liceoj, kaj kiun kompilis la ministerio por eduko, troviĝas ĉapitro *Internacia Lingvo*, biografieto de Zamenhof. Oni faras multan propagandon ĉe instruistoj de liceoj, precipe post kiam mezgrada eduko fariĝis deviga por ĉiu knabo.

Multaj kleruloj lernis kaj uzas Esperanton. La Fakoj de la Funkciaj Ekvacioj de la Japana Matematika Societo eldonis Esperanto-titolan *La Funkciaj Ekvacioj* en kies ĉiu numero aperas artikoloj en Esperanto. D-ro M. Nagumo, profesoro de matematiko en Universitato Osaka, donas en sia prelego fakajn terminojn en Esperanto.

JEI

POLUJO

La 7-an de marto oni aranĝis en Rzeszów propagandan ekspozicion de Esperantaj leteroj, poŝtkartoj, revuoj k.s. en atendejo de kinoteatro. La ekspozicio daŭris la tutan tagon kaj ĝin rigardis proksimume 1000 personoj. Multa intereso estis stimulata kaj precipe la skoltaj faris informpetojn. Post petskribo al la lerneja kuratoro la oficiala instanco malfermis kurson de Esperanto al kiu aliĝis 100 geskoltoj, kiujn oni devis dividi en du klasojn.

Restarigo de Esperanta monumento

En aŭtuno pasinta la Regiona Esperanto-Ligo kunlabore kun la klubo en Bohumin, Ĉeĥo-slovakujo, oficiale inaŭguris Esperantan monu-

menton, kiu anstataŭas similan detruitan de la Germanoj dum la milito. Nia fotografaĵo montras la simplan sed belan memorigilon.



Agado en Ĉeĥoslovakujo

Preskaŭ ĉiuj organizaĵoj ĉiujare donas raporton pri sia agado, sed en la aprila numero de *Esperantista, Revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakujo*, troviĝas jarraporto, kiu povus servi kiel modelo por la tuta mondo.

Per la 27 paragrafoj oni ricevas perspektivan bildon pri la multflanka kaj ampleksa laboro de la organizaĵo kaj admiras la objektivan administradon, kiu difinas la personojn kaj la laborteronon tiel, ke ĉiu havas sian taskon kaj neniun fakon implikiĝas, je kosto de kompetento, kun la agado de aliaj fakoj.

La raporto mem estas objektiva kaj klara, kaj laŭdirde ŝparas vortojn sen perdo de esencaj faktoroj. Aparte interesaj kaj instruaj estas la informoj: 8. Publikiga agado, 9. Kontakto kun oficialaj aŭtoritatoj, 12. Lernejoj, 13. Propaganda ĝenerala, 15. Prelegvojaĝoj de fremduloj, 16. Somera Esperanto-lernejo kaj 18. Radio.

Ĉio montras, ke la ĉeĥoslovakaj samideanoj plene konscias la gravon de laŭcela planado kaj scias racie organizi sian aferon. Ĉi tiu raporto estas inda je ekzameno kaj pristudo ĉar ĝi enhavas multajn altvalorajn lecionojn por niaj administrantoj.

M.S.

Junul-tendaro en Francujo

La Grupo en Versailles, apud Parizo, intencas organizi por la Esperanta junularo tendaron dum Julio de la 15-a ĝis la 25-a.

Jen estas la ĉefaj punktoj: la tendaro situos en tre bela loko de granda urba parko por sportoj. Tiuj kiuj ne povos elteni estos loĝigataj en lernejo. Aĝo: 12 ĝis 25 jaroj. Oni akceptos ĝis 300 partoprenantoj. Oni sin turnu al: S-ro Chilard, Del. de U.E.A., 5 Avenue de St. Cloud, VERSAILLES, Francujo.

Nova Espero

En la mondon venis la teroro,
Tra la mondo bruis uragano,
Malaperis humanec' kaj moro,
Regis eŝafodo kaj ĉikano.
Dum teruraj noktoj de bombardo
Disvastiĝis frakasanta flamo,
Kaj de l'homa koro milda ardo
Cedis pro diabla la malamo.
Preterpasis la infera sceno,
Jam la horizonto ekheliĝas;
Jen krepuskas nove la mateno
Kaj la mondo ree plibeliĝas;
Sed la homoj longe turmentitaj
Jam ne kredas je la venk' de l'bono,
Kaj de febra konvulsi' skuataj
Ili tremas antaŭ la demono.
Havu fidon, kara homofrato,
Kredu firme je la nova tago;
Liberiĝu de l' miljara fato
Kaj kunmarŝu sub la paca flago;
Ĉar ni ĉiuj, ĉiuj estas homoj,
Gvidu nin, ho signo de l'espero!
Kaj ni venkos kontraŭ la fantomoj,
Per la amo, bono kaj la vero!

Originale verkita de Karl Knoll.

Cigna Kanto

de

Otto Manningen

Kun bril' neĝo-pala
la cignojn sur maro
nun portas ondaro
de sonĝo opala.

Io trans horizonto
sufoke altiras,
sed sole akiras
akordon falonto.

Trilante nun kio
eteron vibrigis?
Nur plumo rompiĝis,
perdiĝis nenio.

*Tradukis Vilho Setälä,
Finnlando*

LA PETSKRIBO

Landoj

Germanujo ..	2,082,453	Islando ..	4,348
Ĉeĥoslovakujo ..	1,031,464	Portugalujo ..	3,462
Norvegujo ..	459,692	Aŭstralio ..	3,370
Brazilo ..	169,446	Novzelando ..	2,540
Francujo ..	61,862	Svisujo ..	2,250
Nederlando ..	52,670	Egiptujo ..	1,832
Britujo ..	27,839	Maroko ..	1,278
Bulgarujo ..	21,992	Grekujo ..	974
Svedujo ..	18,373	Palestino ..	528
Aŭstrujo ..	15,958	Irlando ..	463
Jugoslavujo ..	14,138	Urugvajo ..	460
Italujo ..	11,814	Kanado ..	360
Polujo ..	9,721	Sud-Afriko ..	290
Danujo ..	9,107	Hispanujo ..	276
Usono ..	6,808	Hindujo ..	236
Belgujo ..	6,614	Ceteraj lokoj ..	597
Finnujo ..	6,390		
Argentino ..	6,248	sumo ..	4,042,013
Hungarujo ..	6,160		

Kolektivaj subskriboj ricevataj dum Aprilo :
Bayerischer Gewerkschafts-Bund, München,

Germanujo	466,049
Ned. Vegetarien Bond, Haarlem, Nederlando ..	5,645
Freier Gewerkschaftsbund Hessen, Germanujo	400,000
Federação Espirita Brasileira, Rio-de-Janeiro	162,735

(Inkluzivitaj en la ĉi-supra sumo).

Okupoj

Artistoj ..	2,048	Navigaciistoj ..	1,126
Delegitoj Komunumaj	517	Parlamentanoj	246
Dentistoj ..	568	Policistoj ..	2,358
Desegnistoj ..	2,096	Presistoj ..	3,262
Dommastrinoj	44,876	P.T.T.-istoj ..	8,916
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,145	Religiistoj ..	1,504
Elektristoj ..	3,011	Sciencistoj ..	1,196
Farmacistoj ..	1,290	Sindikataĉefoj ..	457
Farmistoj ..	10,002	Soldatoj ..	3,361
Hotelistoj ..	1,695	Studentoj ..	32,341
Inĝenieroj ..	13,748	Ŝoforoj ..	2,351
Instruistoj ..	18,549	Ŝtatoficistoj ..	7,741
Juristoj ..	1,726	Teksistoj ..	1,378
Ĵurnalistoj ..	1,171	Transportistoj ..	357,357
Komercistoj ..	57,858	Urboficistoj ..	3,695
Konstruistoj ..	6,382	Vendistoj ..	9,068
Kuracistoj ..	4,417	Vestistoj ..	6,177
Laboristoj ..	21,550	Diversaj okupoj	3,384,122
Lingvistoj ..	325		
Metiistoj Diversaj	22,383	sumo ..	4,042,013

Per pliaj grandsumoj niaj germanaj samideanoj eĉ pligrandigis sian ciferon kaj ilia kontribuo sumiĝas je duono de la tuta sumo de la petskribo. Ni estas certaj, ke aliaj kunlaborantoj, en spirito de amika konkuro, ne volos lasi la situacion tia, sed strebos al akiro de la laŭrokrono. Ni direktas nian gratulon al samideanoj en Brazilo, kiu faris konsiderindan kontribuon per la subskribo de la Spiritista Federacio.

Ni volas korekti eraron, kiu aperis en la Maja numero. La eminenta subskribo el Polujo ne estis de la Prezidanto de la lando, sed de la Ministro-Prezidanto. Ni kaptas la okazon denove atentigi niajn kunlaborantojn, ke kun tiaj subskriboj oni sendu klarajn detalojn por ke ne okazu tiuspecaj ĝenaj miskomprenoj.

VARBU VIAJN AMIKOJN POR U.E.A.

Artefarita pluvo

Reguligo de pluvo ; tio estis la revo de multaj personoj, precipe la farmistoj. Revo, nerealigita revo ĝi estis ; sed sciencistoj, kiuj kredis la eblon de la realigo de tiu revo kaj komencis aktivajn eksperimentojn antaŭ kelkaj jaroj, jam montris unuan paŝon al sukceso.

Unu metodo konsistas el disŝuto de subtila pulvoro de *seka glacio* el fluganta aeroplano en nubon, kiu ne povas per si okazigi pluvon. La eksperimentoj estis farataj en Usono kaj oni sukcesis ŝanĝi nubon kun longo de 3 mejloj en neĝon en du minutoj per unuopa aeroplano.

Plue, rimarkinda antaŭsupozo, ke arta ŝanĝo de vetero pli grandskala ol la supredirita metodo estas ebla, precipe en la vintro, estas publikigita de konata D-ro Irving Langmuir ĉe Ĝenerala Elektro-Kompanio en Usono. Temas pri *cirus*-projekto. Ĉi tiu projekto estas unuigita esploro entreprenita de la Armea Komunik-korpuso, Oficejo de Esploro de la Mararmeo, kaj la Aeraj Fortoj de Usono por reguligo de vetero.

La doktoro raportis, ke la ĝena uzado de seka glacio nun estas nenecesa, kaj ke eĉ malgranda kvanto da akvo, se ĝi estas disverŝata sub taŭga kondiĉo, en konvena tempo kaj sur taŭgan nubon, povas okazigi fenomenon nomitan *ĉenreakcia pluvado*.

La supereco de tiu lasta metodo estas, ke oni povas okazigi pluvon de la *cirus*-nuboj en arbitra temperaturo. Pluvo okazas kiam nubo moviĝas supren minimume 5 mejlojn en horo, enhavas riĉe kreskintajn akverojn kaj estas dika 5000 ĝis 6000 futojn.

La akveroj, kiujn oni ĵetas de aeroplano, kreskas pli kaj pli ĝis ili havas limdiametron de $\frac{1}{8}$ colo ; poste ili disiĝas en akvogutojn. La lasta akvero denove kreskas kaj ankaŭ ĝi disiĝas k.t.p., do la fenomeno estas nomita ĉenreakcio.

Alia metodo de pluvokazigo estas uzado de arĝenta jodido. Tiu medikamento estis utiligata por milita ekfumigo en la milita tempo sed nun ĝi fariĝas la patrino de pluvo.

En la estonteco la eblo de arta reguligo de pluvo ne estos limigata je la supre menciitaj metodoj. Oni povas esperi pri ĉesigo aŭ moderigo de tondropluvo, ekstermo de hajlo, laŭvola konduko de pluvo aŭ neĝo al indikitaj regionoj, kaj defendo kontraŭ glaciigo sur aeroplano.

Glaciigo estas fatala problemo por la aviado, sed la sciencistoj pensas, ke tiu problemo estas solvata. La raporto montras ekzemplon en kiu truo estis farata en glaciigema nubo per la pafado de seka glacio el la aeroplano.

de Nakamura Yukio, Inĝeniero de Elektro-Esplorejo de Ministerio de Komunikoj, Japanujo. (el *La Orienta Revuo*)



El la Tria Informilo

Adreso por leteroj : 33a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo. Tel : 380 81.

Presaj disdonotaj en la kongresejo aŭ en kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de LKK.

UEA-komitatanoj estas petataj sciigi al LKK, ĉu ili venos kaj kiam kaj ĉu oni aranĝu loĝejon por ili.

Radio. Radiosendaĵoj per mallongaj ondoj 19.80m. kaj 27.83m. la 6an de Junio kaj 4an de Julio je 16.00–16.15h. MET (15.00–15.15 Greenwich). Ĉiuj kongresanoj aŭskultu ilin.

Salutoj. Ĉe la malferma solenaĵo ĉiuj nacioj rajtas saluti la kongreson. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ antaŭ la kongreso sciigi al LKK la nomon de tiu persono kiu salutos por via lando.

La Kongresa Programo

Kongresejo : La urba teatro.

Vendrede. Akceptejo en la centra stacidomo.

Sabate. Akceptejo en la centra stacidomo 7.00–9.00. Kongresejo en la urba teatro 10.00–18.00.

15.00 Kunsido de UEA-Estraro kaj LKK.

19.00 Solena malfermo en la urba teatro.

21.00 Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉe.

9.00 Diservoj.

11.30 Fotografado.

16.00 UEA-komitato.

17.00 Fakkunsidoj.

19.00 Vizito en "La Popola Parko".

Lunde.

9.00 Somera Universitato.

10.00 Unua laborkunsido.

14.00 Ekskursoj.

14.30 Fakkunsidoj.

15.00 UEA-komitato.

17.00 Lingva Komitato.

20.00 Literatura vespero.

Marde.

9.00 Somera Universitato.

10.00 Dua laborkunsido.

14.00 Fakkunsidoj kaj ekskursoj.

17.00 UEA-komitato.

20.00 Kabareda vespero internacia.

Merkrede.

8.45 Somera Universitato.

12.00 Krozado en la markolo.

20.30 Liberaera koncerto.

Ĵaŭde

9.00 Somera Universitato.

10.00 Tria laborkunsido.

14.00 Fakkunsidoj kaj ekskursoj.

15.00 UEA-komitato.

20.00 Kongresa balo.

Vendrede.

9.00 Somera Universitato.

10.00 Fakkunsidoj.

14.00 Kunsido por ĈD kaj Perantoj de UEA.

14.30 Fakkunsidoj.

15.30 UEA-komitato.

Sabate.

9.00 Somera Universitato.

10.00 Solena fermo de la kongreso.

STATISTIKO DE KONGRESANOJ

Svedujo ..	581	Brazilo ..	3
Britujo ..	152	Jugoslavujo ..	3
Danujo ..	104	Ĉilio ..	2
Francujo ..	104	Palestino ..	2
Norvegujo ..	80	Sud-Afriko ..	2
Finnlando ..	61	Argentino ..	1
Nederlando ..	30	Aŭstralio ..	1
Ĉeĥoslovakujo ..	27	Egiptujo ..	1
Svisujo ..	25	Portugalujo ..	1
Belgujo ..	22	Rumanujo ..	1
Hungarujo ..	22	Venezuelo ..	1
Germanujo ..	19	Trieste ..	1
Italujo ..	15		
Usono ..	8		1289
Bulgarujo ..	7	Rezervitaj ..	16
Aŭstrujo ..	6		
Polujo ..	4	El 30 landoj ..	1305
Hispanujo ..	3		

Eminentuloj partoprenas grupkunsidon.


En kunsido de la Brazila Klubo Esperanto en Rio-de-Janeiro konata arkitekto Profesoro Alfred Agache, pioniro de Esperanto en Francujo, faris rimarkindan prelegon pri memoraĵoj el la pasinteco. S-ro A. Caetano Coutinho prezidanto de la klubo invitis Prof. E. Backheuser prezidi la kunsidon. Ĉeestis inter aliaj S-ro D. de Carvalho—Ministro de Terkulturo, S-ro Charles Redard—Ministro de Svisujo, kaj S-ro N. Silves de la Klubo de Inĝenieroj.

Nia fotografaĵo montras la nomitajn eminentulojn.



TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Sep Fratoj** de Aleksis Kivi.
Eld. Eldono Vilho Setälä.
Traduko el finna lingvo. 360
p. 18×13cm. Kartonita 16½
ŝil., broŝ. 13 ŝil.

La eldono de ĉi tiu finna klasikaĵo estas eksterordinara kaj atentinda okazaĵo en la Esperanta literaturo. La internacia legantaro jam ekkonis la intiman stilon de Aleksis Kivi per liaj bonhumoraj *La Botistoj* kaj *La Fianĉiĝo* kaj per la lirika dramo *Lea*, ĉiuj pri la kamparana vivo. La trajtoj kiuj distingas tiujn verkojn troviĝas en la multe pli ampleksa *Sep Fratoj* kaj tie trovas pli detalan elvolviĝon kaj pli vastan traktadon.

La romano prezentas la vivon—de infanaĝo ĝis maturiĝo—de la sep fratoj de la kampara domo Jukola, kaj per kurioza rakontmaniero—jen priskriba, jen dialoga kvazaŭ en teatraĵo—la aŭtoro sukcesas konigi, eĉ karigi, al ni la personojn de la sep roluloj. Oni ridas je la petolaĵoj—kaj kiaj ili ja estas!—de la sep diabletoj, kaj sekvas kun streĉa intereso la aventurojn jen en la primitiva arbarego, jen sur farmbieno kiun ili konstruas al si, la ursoĉasadojn kaj la luktojn kontraŭ la fortoj de la naturo. Per siaj sep fratoj A. Kivi kristaligas por ni la diversajn aspektojn de maturiĝantaj junuloj en primitiva ĉirkaŭaĵo kaj ebligas al ni sekvi la diversajn influojn de la medio kaj la heredo eĉ ĝis la plenkreskinta homo.

Elstara ero en la arto de Kivi estas la mirigaj vortbildoj, kiujn li kreas. Per nur kelkaj trafaj vortoj aŭ frazoj li igas preterpasi antaŭ la *anima okulo* de la leganto la viglajn kaj iafoje terurajn scenojn el la vivo de la sep fratoj. Konsideru ekzemple la embarason de la sep, izolitaj sur granda ŝtonego en la arbaro dum pluraj tagnoktoj ĉar ilin ĉirkaŭas kvardek malicaj virbovoj; kaj poste, por liberigi sin ili devas pafmortigi ĉiujn! La terura naŭza spektaklo fariĝas viva bildo antaŭ niaj okuloj. Kaj tiu estas nur unu el multaj simile viglaj priskriboj.

Sep Fratoj estas vera eposo en prozo kiu konigas al ni la vivon en la fora nordlando, kaj ĝi posedas la tutan ĉarmon de popolkanto.

La traduko ŝajne estis kolektiva afero. Tradukis I. Ekström en Turku, ĝin reviziis studrondo en Helsinko, tralegis la manuskripton kelkaj eminentaj Esperantistoj diverslandaj, kaj laŭ noto, la lingva formo aperas sub la respondeco de Vilho Setälä. Tio estas impona antaŭzorgo, sed la rezulto spegulas tion. La nivelo de lingvo-uzo estas alta. Por la serioza studanto

de tendencoj ĉi tiu verko prezentas plurajn facetojn de intereso. Ĉe traduko oni kutime elektas unu el du ĉefaj principoj: tuta Esperantigo por garantii tujan kaj tutan kompreneblon, aŭ konservo de originalaj pensformoj en la teksto, kun notoj klarigaj en la fino.

Mi ne volas aldoni al la polemiko per esprimo de opinio sed registras nur mian konstaton pri ĉi tiu traduko, kiu sekvas la duan principon. Per tiu prezento oni konservas karakteron de folkloreco, kaj neniu povas nei la allogon kaj ĉarmon de la uzo de popolesprimoj kaj kuriozaj parolturnoj el la originalo. Mi kredas, ke en tio la ĉarmo de la verko konsistas. Mi tamen devas registri, ke la multfoja konsultado pri la notoj en la fino (25 paĝoj da ili!) por ricevi la ĝustan signifon de tiu aŭ alia idiotismo, parolturno aŭ nacia esprimo tre ĝenis min. La skolo, kiu deziras, ke iam Esperanto havu propran karakteron kun propraj rimedoj kaj rezervoj por la transdono de kiu ajn nuanco de penso, verŝajne ne multe aprobas ĉi tiun metodon. La traduko tamen estas gravega por nia literaturo kaj mi tre forte rekomendas ĝin, kaj laŭ lingva, kaj laŭ literatura vidpunktoj. M.S.

Zelando kiel Turist-Regiono: teksto de la filmstrio 146/13 eldonita de Esperanto Film-Grupo, Bergen-op-Zoom, Nederlando. Prezo nemontrita. Priskriboj pri 42 bildoj. En modela lingvo. Interesa kaj instrua.

Pollando rekonstruiĝas el ruinoj: eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. 16-paĝa broŝuro informa. Prezo nemontrita.

Gramatiko: Greklingva lernolibro de Esperanto de D-ro A. Stamatiadis. Kun ilustraĵoj. La Esperantaj tekstoj estas modelaj kaj bone elektitaj. Broŝ. 152 paĝoj. Prezo nemontrita.

Esperanto Dili: Pratik Kurs Kitabo: Esperanto-kurso por Turkoj, de Prof. Hulusi Aydinoglu. Broŝ. 15-paĝa. La Esperantaj tekstoj enhavas tre multajn erarojn kaj kreas dubojn pri la ĝusteco de la ceteraj tekstoj, neesperantaj. Preso kaj papero nebonaj; prezo nemontrita.

Esperanto—Leicht Gemacht! La eldonejo *Die Zukunft* en Reutlingen, Germanujo kunigis en modestan volumon la lecionojn, kiujn ĝi aperigis en la junular-gazeto samnoma, kiu eldoniĝas je 130,000 ekzempleroj.

Facile Lerni Esperanton: Gemakkelijk Esperanto Leren. Nova lernolibro por Nederlandanoj. La tekstoj estas bonaj kaj simplaj, kaj indikas bonan kompilon. Ĉe libroservo de F.L.E., Postbus 8002, Amsterdam-W, Nederlando. Prezo nemontrita.

INTERNACIA NORMIGO DE EKZAMENOJ

Samideanoj de tempo al tempo sin turnas al U.E.A. kaj al aliaj instancoj kun informpeto pri normigo de Esperanto-ekzamenoj, por konstati, ĉu ekzistas kunordigo de tiaj provoj tra la mondo.

Ni do volonte publikigas informon, donitan jam antaŭ la milito pri ĝuste tia normigo, kiun entreprenis la Lingva Komitato. La tekstoj fakte troviĝas en la Jarlibro de la Lingva Komitato 1936.

Diplomoj : Por determini la valoron de la naciaj lingvaj diplomoj, la Sekcio de Kontrolo komparas ilin kun kvar normaj diplomoj, kiuj estas :

I. Norma elementa diplomo (N.E.D.) kiu certigas, ke la posedanto kapablas uzi la lingvon skribe kaj parole por la bezonoj de la ĉiutaga vivo ;

II. Norma supera diplomo (N.S.D.) kiu certigas, ke la posedanto, kiu jam posedas la elementan diplomon, kapablas uzi la lingvon pri literaturaj kaj teknikaj temoj ;

III. Norma klereca diplomo (N.K.D.) kiu certigas, ke la posedanto tute kaj ĝisfunde scipovas la lingvon, kaj konas ĝiajn bazojn, konstruon, historion kaj literaturon ;

IV. Norma diplomo pri instrua kapableco (N.I.D.) kiu certigas, ke la posedanto kapablas instrui Esperanton, gvidante kursojn, ĉu por la elementa diplomo, se li (aŭ ŝi) posedas la superan diplomon, ĉu por la supera diplomo, se li (aŭ ŝi) posedas la klerecan.

La valoron de ĉiu nacia diplomo montros la jena teksto menciata sur ĝi :

“Laŭ sciigo de la Sekcio de Kontrolo de la Akademio, la posedanto de tiu ĉi diplomo kapablas ricevi la . . . norman diplomon.”

Tiu ĉi mencio ne signifas respondecon de la Akademio pri la lingva scipovo de la posedanto ; pri ĝi nur la naciaj ekzamenantoj estas respondaj. Tamen la posedanto rajtas aldoni, post sia nomo, la literojn respondantajn al la menciita norma diplomo.

En la sama Jarlibro troviĝas listo de normigitaj naciaj diplomoj en pluraj landoj. Jen la listo :

Normigitaj naciaj diplomoj

(Post ĉiu ekzameno la litero inter krampoj montras la respondan norman diplomon : E=elementan ; S=superan ; K=klerecan ; I=instruan).

Aŭstrujo Ŝtataj ekzamenoj : atesto pri scipovo de Esperanto (E) ; atesto pri instrua kapableco (I).

Belgujo

Ekzameno pri profesora kapableco (I).

Britujo

Ekzamenoj de B.E.A. : elementa atesto (E) ; supera ekzameno, diploma atesto D.B.E.A. (S) ; licenciata diplomo L.B.E.A. (K). Ekzamenoj de Royal Society of Arts : elementa (E) ; meza (S).

Ĉeĥoslovakujo

Ekzamenoj : pri scio de Esperanto (E) ; pri kapableco instrui Esperanton (K.I.) ; oficiala ekzameno (S.I.).

Finnlando

Elementa diplomo (E) ; supera diplomo (K).

Francujo

Atesto pri lernado (E) ; supera atesto pri lernado (S) ; atesto pri instrukapableco (I) ; diplomo pri altaj Esperantaj studoj (K.I.).

Germanujo

Ekzamenoj : pri kapableco (E) ; pri kapableco kaj kursgvidado (I) ; pri pedagogia kapableco (S.I.) ; pri scienca kapableco (K).

Grekujo

Atesto pri studado (E) ; atesto pri lingva kapableco (S) ; profesora diplomo (K.I.).

Hungarujo

Ekzamenoj : parola (E) ; kursgvida (S.I.).

Nederlando

(Laborista Federacio) A-diplomo (E) ; B-diplomo (I). (Esp. Ekzamena Komitato) A-diplomo (E) ; B-diplomo (I).

Norvegujo

Ekzamenoj : elementa aŭ unuagrada (E) ; supera aŭ duagrada (S).

Svedujo

Ekzamenoj : elementa (E) ; supera (S) ; kaj eventuale instrua pri elementaj kursoj (I) ; instruista por ĉiuj kursoj (I).

Svisujo

Atesto pri lernado (E) ; supera diplomo (S.I.).

Usono

Atestoj : pri lernado (E) ; pri kapableco (S) ; pri instruado (I).

Bahaanoj reaktivis en Germanujo

Post iniciato de S-ro Adolf Lorey kaj D-ro Adelbert Mühlischlegel kaj F-ino Elsa M. Grossmann-Neckargemünd oni restarigis Esperanto-Komitaton por Bahaismo. Oni esperas baldaŭ ricevi permeson de la usona aŭtoritato denove eldoni *La Nova Tago*. Oni sin turnu por informoj al S-ro A. Lorey, (16) KREIDACH üb. Waldmichelbach/Odw.am Bahnhof, Germanujo.

VOĈO EL JAPANUJO

Ni sendas al vi koran saluton el la malgranda insularo en la malproksima oriento. Ni volas informi vin pri nia vivo kaj laboro kaj esperas, ke vi etendos al ni amikan manon por apogi nin en nia malfacila penado.

Ni estas studentoj de malgranda lernejo en Japanujo, unu el la landoj, kiuj nepardoneble pekis kontraŭ la paco kaj la feliĉo de la homaro, okaziginte la lastan teruran mondmiliton. Ni pasigis niajn knabaĝajn tagojn en la mezo de la milito kaj kreskis kun ĝi. Ni ne sciis, kaj ne povis scii, ke nia patrujo pekadas nekompenseble, kaj ni kredis en nia nescio, ke oferi nian junecon kaj nian vivon por la milito estas la unusola destino por ni en la vivo.

La malvenko de japana militarismo kaj la venko de la internacia demokratio en la somero de 1945 tamen unuafoje malfermigis al ni la okulojn. De tiam kun ĉiu tago ni pli kaj pli konvinkiĝas pri la grandeco de demokratio kaj pri la profundeco de la peko de Japanujo kontraŭ la homaro. Ĉi tiu peko neniam forviŝiĝos ĝis la tago kiam Japanujo efektive renaskiĝos kiel vera demokratia lando kaj ĉiu membro de nia nacio fariĝos vere pacama civitano. Ni batalos per niaj malgrandaj sed kunigitaj fortoj por helpi la demokratiigon de Japanujo kaj ni esperas, ke vi komprenos kaj helpos kaj gvidos nin en nia modesta penado.

Nia lernejo fondiĝis en la printempo de 1946 en la antikva japana urbo Kioto. La fondintoj de nia lernejo estis Takesi Sinmura nia lernejestro, Osamu Kuno nia profesoro de filozofio, kaj kelkaj iliaj amikoj. Ili estas inter la veraj demokratoj kaj pacamantoj, kiuj ne mankas ankaŭ en Japanujo.

Ni komencu per mallonga priskribo pri ĉi tiuj niaj instruistoj, ĉar ni ŝuldas ekskluzive al ili tion, ke ni progresis en mallonga tempo tiomgrade, ke ni memvole decidis batali por la demokratio kaj kontraŭ la malnovaj fortoj, kutimoj kaj pensmanieroj, kiuj ankoraŭ restas ĉie en nia lando, kaj raportu per Esperanto al la kamaradoj de la tuta mondo pri nia vivo kaj laboro.

Takesi Sinmura, nia lernejestro, estas 43-jara scienculo, kiu komencis sian karieron kiel studanto de franca literaturo. En 1937, kiam Japanujo komencis grandskale invadi Ĉinuojn, li kaj liaj amikoj energie informadis la japanan publikon pri la kontraŭ-faŝisma kampanjo kiu elvolviĝis tiutempe en Francujo kaj Hispanujo, kaj tiamaniere alvokis la japanajn laboristojn kaj intelektulojn batali kontraŭ la faŝismo kaj militismo ankaŭ en Japanujo. Pro tio, la japana sekretpolico arestis kaj enkarcerigis ilin dum pli ol du jaroj.

Ĉi tiu afero estis epokfara ĉar de tiam la sekreta polico en la manoj de la japanaj nigraj politikaj fortoj komencis subpremi kaj aresti eĉ liberalulojn, krom socialistoj kaj komunistoj, kiujn ili ĝis tiam kontraŭagis.

Dum la milito Takesi Sinmura helpis sian patron D-ron Izuru Sinmura ĉe kompilado de vortaro. D-ro Sinmura estas unu el la plej grandaj japanaj lingvoscienculoj, kaj partoprenis la kvaran Universalan Esperanto - Kongreson en Dresdeno en 1908, reprezentante la japanan Esperantomovadon.

Osamu Kuno, nia profesoro de filozofio, servis en unu lernejo, ne kiel instruisto, sed kiel simpla oficisto, kaj sekrete tradukadis en japanan lingvon *Logic* (Logiko), ĉefverkon de granda usona filozofo John Dewey. Tiel ili restis dum la milito, scienculo kaj profesoro, al kiuj oni ne permesis verki nek instrui.

Tuj post la malvenko de japana imperialismo ili ĝisfunde kritikis la ĝistiaman japanan edukistemon kun ĝiaj multaj mankoj, kaj decidis organizi novan lernejon por eduki junulojn en vere demokratajn civitanojn kaj ili fondis la lernejon en kiu ni nun lernas. Kontraste kun la malnovaj lernejoj, kiuj celis eduki la junulojn en nur duonfeŭdalajn burokratojn kaj tiuspecajn oficistojn, kiaj servas nur al la reganta malplimulto nepensante pri la feliĉo de la popolamasoj, nia lernejo celas eduki homojn, kiuj antaŭ ĉio laboras por la popolo, inter la popolo kiel *la salo de la tero*. Jen kial nia lernejo prenis la titolon *humanisma* kaj nomas sin Kiota Humanisma Lernejo.

En ĝi nun troviĝas 130 studentoj kaj 27 instruistoj. Ili kune administras la lernejon en demokrata maniero. Ĉio en la lernejo, de elekto de lernobjektoj ĝis financaj aferoj, estas decidita post interkonsiliĝo inter instruistoj kaj studentoj. Inter la 130 studentoj troviĝas 18-jaruloj kaj 33-jaruloj. Ankaŭ kun ni lernas du koreaj junuloj. Unu el ili estas 33-jara, nia plejaĝulo. Li estas laboristo kiu venis al Japanujo el sia patrujo kiam li estis 14-jara kaj de tiam sin okupis pri la plej diversaj laboroj. Li nun studas kun ni preparante sin por la tago, kiam li povos labori en sia patrujo, kiu liberiĝis el la longjara kruela subjugiĝo de la japana imperialismo, kaj kiu nun strebas al tuta sendependeco. Li lernas Esperanton kun ni.

Alia 33-jarulo estas malfeliĉa vidvino, kiu perdis sian edzon en la milito kaj krome 2 el siaj 3 infanoj dum aeratako. Dudek el niaj 130 amikoj estas virinoj, kaj tiu cifero de 15% da virinoj estas rimarkinde granda en Japanujo.

En la Ekonomia Fakultato en Kobe ekzemple, inter la 250 studentoj tie en 1947 troviĝis nur unu studentino, kaj ĉe la Kiota Universitato inter kelkmil da studentoj troviĝas nur 20 inoj.

La nova konstitucio, kiu efektiviĝis en la lasta jaro, donis al japanaj virinoj laŭjure egalan rajton kun la viroj, sed la malnova tradicio restinta el la japana famili-sistemo kaj kutimo ankoraŭ firme jugas la virinon sub la viron. Ĉio ĉi tio montras kiom malfacile estas por japanaj virinoj ricevi superan edukon, eĉ se ili ĝuus ekonomiajn avantaĝojn kaj estus science kompetentaj por tio. Des pli da eksterordinaraj decidemo kaj kuraĝo ili devas havi, kaj batalon entrepreni en la hejmo se ili volas eniri en lernejon, kie gestudentoj lernas kune, kiel en la nia. Niaj 20 amikinoj do estas pioniroj en ĉi tiu rilato. Kvin el ili lernas Esperanton kun ni.

Laŭ la ĝisnuna malnov-orienta filozofio oni ne povas pensi pri tio, ke gejunuloj lernu flankon ĉe flanko. Ĝis la tago de la malvenko de la japana imperialismo oni severe apartigis la sidlokojn de virinoj kaj viroj en kinejoj kaj tiuj kiuj tien iris kun siaj edzinoj aŭ amatinoj devis sidi en speciala loko destinita por tio. Sed nun ni lernas kune, viroj kaj virinoj, unu apud la alia en granda amikeco. Ni ankoraŭ ne havas, nek havos estontece ian sperton de fiasko, kiu povus provizi al la konservativuloj taŭgan materialon por riproĉo pri la komuna edukado.

Ni lernas gaje sed nia vivo estas ege malfacila. Ni devas multe klopodi por akiri nur tiom da nutraĵo kiom necesas por vivi. El la budĝeto nia, 80% estas la elspezo por nutraĵoj. Eĉ por la simpla vivado ĉiu en nia familio bezonas 2000 jenojn ĉiumonate. Tiu sumo superas la tutan sumon, kiun enspezis mezklasa familio dum tuta jaro antaŭ la milito! Sekve, multaj studentoj devas labori. Ankaŭ ĉe ni kelkaj niaj amikoj forlasis la lernejon por labori. Facile kompreneble estas do kun kiom granda malfacileco ni aĉetas librojn. Malgranda libro apenaŭ 150-paĝa presita sur papero malpli bona ol neceseja papero en via lando, kostas 100 jenojn. Ĉi tiu sumo estas pli granda ol la monatspezo, kiun ricevis japana junulo fininta universitatan kurson antaŭ la milito. Ni tial kontribuis malgrandajn sumojn, aĉetis librojn kaj organizis malgrandan bibliotekon. Ni aŭde legas ĉi tiujn librojn kaj lernas per ili pri la grandaj homoj, kiuj kontribuis multe por la progreso de arto kaj kulturo de la homaro kaj por la demokratio.

Kaj ni komencis havi fortan sopiron kaj intereson al la eŭropa kaj usona kulturoj. Dum la pasinta jaro ni havis okazon vidi kelkajn eŭropajn teatraĵojn en japana lingvo. Ili estis: *Pupa Domo* de Ibsen, *Ludo de Amo kaj Morto* de Romain Rolland, *Rompiginta Kruco* de Heinrich Kleist germana poeto, *Sur la Fundo* de Maksim

Gorki, *Venecia Komercisto* de Shakespeare, *Tartuffe* de Molière k.a. Ni ankoraŭ ne havis okazon vidi usonajn teatraĵojn, preskaŭ neniun usonan libro eldoniĝis. Oni diras, ke tio venas de tio, ke la kopirajta problemoj ankoraŭ ne estas solvita. Ni atendas la tagon kiam ni povos ĝui novan usonan artverkon en japana lingvo. El usonaj gazetoj, japana eldono de *Reader's Digest* estas vaste legata. Oni vendas ankaŭ *Time* kaj *News Week* en niaj librejoj, sed por ni estas malfacile legi ilin, ĉar nia kono de angla lingvo estas ankoraŭ mizera.

Nova usona filmo estas prezentata ĉe ni ĉiusemajne, sed la enirprezo estas tro alta (25 jenoj, el kiuj 15 estas imposto!). Nur malmultaj studentoj povas rigardi filmojn ĉiusemajne. Ni tial iras al la filmteatro malofte, nur tiam kiam oni laŭdas iun aŭ tiun filmon. La plej alte ŝatata el la usonaj filmoj inter ni estis *Casablanca* kiu prezentis epizodon el la kontraŭfaŝista batalo.

Ni havas ankaŭ fortan intereson pri la internacia politiko. La japana popolo ĝenerale ankoraŭ ne havas tre grandan intereson pri la venonta balotado, ekzemple, por la prezidanto de Usono, ĉar ĝi ne havas profundan scion pri la granda influo, kiun povus alporti la rezulto de tiu balotado al la internacia politiko. Sed en nia lernejo ĝi estas unu el la ĉiutagaj temoj de konversacio.

Certe ni devus ankoraŭ multe kaj pli detale rakonti al vi por ke vi povu plene kompreni pri tio, kiel ni vivas, kiel ni aliformiĝas, kiel iras la demokratiigo de Japanujo, kaj en kio konsistas la ĉefaj obstakloj al tio. Sed ni esperas, ke per ĉi tiu mallonga artikolo vi ricevis ioman impreson, kiel ni lernas, kian fortan intereson ni havas pri la internacia afero kaj kiel ni klopodas por fariĝi vere demokrataj, vere pacamaj kaj kulturaj civitanoj.

Ni precipe volas kontakti kun studentoj en aliaj landoj, ĉu individue ĉu kolektive por ekscii pri ilia vivo kaj iliaj lernmetodoj. Tio multe helpas kaj interesos nin.

Oni diris al ni, ke el inter la germanaj junuloj, kiuj naskiĝis kaj kreskis meze de la malordo post la malvenko en la mondmilito unua kaj la sekvinta inflacio, aperis la hitleranoj, kiuj okazigis la mondmiliton duan. Ni finu nian lereron ĵurante, ke ni ĉiel penados ke el la malvenko kaj inflacio pro kiuj ni nun suferas, tiaj junuloj kiaj la hitler-junuloj neniam aperu en nia lando! Ni forte esperas ke la mondo plej baldaŭ pleniĝos per la spirito de nia granda instruisto, D-ro L. L. Zamenhof!

Kun kamaradaj salutoj: Esperanto-rondo, Kami-uchi-Kawazamachi 21, Koyama, Kamikyo-ku KYOTO, Japanujo, Kyoto, Jimban Gakuen.

ENIGMA KONKURSO N-ro 28

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, BRUSSEL-Uccle, Belgujo.


Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 26 :

N-ro 59 : Se oni amas la gaston, oni zorgas la paston. Ŝlosilvortoj : aŭskulti - kreozoto - proklami - bankroti - kristalo - tragedio - komploto - anagramo - kaserolo - arlekeno - praktiko - angeliko - anatomio - respondi - katoliko - ekonomio - rendezvuo - trotuaro - fantazio - principo - kazemato - aroganta - burleska - bagatelo - emancipi - eksporti - palinuro - klarneto - populara - tradicio - oksigeno - retoriko - probabla - lanterno.

N-ro 60 : Se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas. Ŝlosilvortoj : kaserolo - alegorio - bagatelo - aluminio - artikolo - tragedio - beladono - angeliko - amuzisto - retoriko - apokrifa - plastiko - kolegaro - epigramo - reĝidino - plagiato - kosinuso - kamarilo - gladiolo - baritono - aforismo - paflego - diametro - aerolito - triviala - neĝamaso - arabesko - oksigeno.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 24-a konkurso : S-ro H. Westergaard (Dan.) 112p., S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) 110p., S-ro Chr. F. W. Slijper (Ned.) 109p.

Enigmo N-ro 61 : Krucvortenigmo.



Horizontale :

- A. 1. Tio estas necesa por akurata protokolado.
- B. 1. Adamo eble anstataŭigis ĝin per arbofolio ; 7. Estas ne afable, se oni uzas tiun vorton kontraŭ homo.
- C. 1. La antikvuloj kredis, ke ekzistas kvar, ni scias ke ekzistas 92(r) ; 8. Timemaj homoj ofte faras tion(r).
- D. 1. Prefikso ; 3. Entranĉo farita laŭlonge en lignaĵo ; 8. Al malnova amo tio ne okazas.
- E. 1. Sufikso ; 3. Grupo ; 6. Se ĝi malaperus el la atmosfero ni mortus ; 11. Malo de E.1.
- F. 1. Plibeligi(r) ; 6. Ĝi ne ŝatas hundojn.
- G. 1. Tapiŝeto(r) ; 4. Reĝo ; 9. Tiu, kiun oni metas sur ĝin, plejofte jam mortis(r).
- H. 1. Inklino ; 4. Fiŝo ; 10. Trinkajo.

- I. 1. Spiralforma(r) ; 5. Dum la milito oni ofte ne estis tia(r) ; 9. Legomo(r).
- K. 1. Nur Moseo sukcesis akiri akvon el ĝi(r) ; 4. Malgranda kvanto ; 7. Akuta angulo formata de du renkontiĝantaj kurbelinioj.
- L. 1. Belforma floro(r) ; 5. Oni postulas tion de infanoj ; 9. Centro.
- M. 1. Arbetu kun mallarĝaj folioj kaj grandaj floroj ; 9. Maŝino postulas tion de ni.

Vertikale :

1. A. Matematika scienco.
2. A. Urga sciigo ; K. Refaldita bordero ĉe tuko(r).
3. A. Posedanto de la plej granda nazo ; K. Oni ofte demandas tion, serĉante ion.
4. A. Nekonforma al la devo kaj virto(r) ; I. Maldensa.
5. A. Korpoparto ; F. Spirito ; L. Sufikso.
6. A. Konata en Venezio ; H. Korpoparto(r).
7. A. Disvastigas la peston ; E. Diametre kontraŭ la nadiro ; L. Sufikso.
8. A. Scienco pri homaj rasoj.
9. A. Bezonata por nia ĉiutaga pano ; G. Insektomanĝanta mambesto.
10. A. Helpa kunsidanto de juĝisto ; H. Pli aŭ malpli dika etendaĵo de iu substanco(r).
11. A. Loĝejo(r) ; D. Trinkajo ; G. Militista ĉapo ; L. Prefikso.
12. A. Scienco pri la vivo de birdoj.

Enigmo N-ro 62 : El la literoj de la vorto **ŝtatperfidulo** faru kiom eble da kvinliteraj aŭ pli grandaj, oficialaj, nederivitaj substantivoj. Atentu bone, ke nur la litero **t** povas dufoje troviĝi en kiu ajn vorto. Bonvolu en via solvo skribi la vortojn alfabeto ordigitaj. Poentnombro dependos de la nombro de ensenditaj korektaj vortoj.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Latimer. Al Friedel kaj Richard Fox Latimer, je la 7a de Majo, filino nomita Brünnhilde Friedel Hansi. (Nova adreso : c/o D. A. Le Coultre, Kidman Avenue, South Guildford, Western Aŭstralio).

Edziĝo

Willemsen-Dullaert. Je la 10a de Majo Ab Willemsen, fakdelegito en Arnhem, Nederlando, kun Jo Dullaert. Ni gratulas.

Niaj mortintoj

Sinjoro Onisabro Deguĉi, iniciatinto de la Oomoto-movado en Japanujo, forpasis 19-1-1948, 78 jaraĝa. Multaj memoras ĉi tiun nomon OOMOTO, kaj tiun de la fondinto, kiu mem tre bona Esperantisto kaj Delegito de UEA en Kameoka, verkis tre taŭgajn lernolibrojn (eĉ poezie !) por Japanoj, rekomendinte lernadon de nia lingvo al siaj disĉiploj. La funebra ceremonio okazis en Ayabe, 35 km. de Kameoka, estinta centro de la nomita movado. Onisabro Deguĉi estis vera martiro de ideo, suferinte enkarcerigon, humiligon ĉiuspecan flanke de la enlandaj naci-militaristoj. Post sesjara mallibero la venko de la Alianco redonis al li liberecon, kaj kun nerompita persisto li restarigis la movadon sub la nova nomo Aizen-En, t.e. ĝardeno de la dieca amo. La multaj amikoj de la estinta OOMOTO konservas bonan memoron al ĝia instiginto.

(Laŭ letero de Koogecu Niŝimura, Kameoka, de 1-3-1948)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 206

1an de Majo 1948

Nova Komitatano.

D-ro T. Van Gindertaelen, Leopoldstr. 99,
Mechelen, Belgujo.

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Stenografio) : C. Raffo, Humberto I,
532, Dpto 5.

Aŭstralio

Bogong. D : F. Halls, Bogong, Via Wodonga, Victoria.

Francujo

Aix (Provence). VD : H. Malinvaud, 15 Rue du 4
Septembre. Tel : 0.91.

Auxerre (Yonne). D : F-ino M. Horné, 3 Place de
l'Arquebuse.

Berthelange (Doubs). D : S-ino J. Trésorier, Ecole de
Berthelange, par Saint-Vit.

Bron (Rhône). D : G. Dartois, 11 Chemin des Balmes.
Tel : P.9232.

Chalon-sur-Saône. D : H. Laforest, 8 rue Henri Poincaré.

Chantilly (Oise). D : A. Gailliot, 3 Square des Aigles.
Tel : 249.

Clermont-Ferrand. VD : M. Vermynck, 2 Rue Godefroy
de Bouillon.

Colombes (Seine). D : G. Knopf, 55 rue Pierre Geofroix.

Epernay (Marne). D : M. Crochet, 8 Route de Mandeuil.

Le Pin la Garenne (Orne). D : P. Giligny, instruisto.

Levallois Perret (Seine). D : H. Fourmy, 45 Rue Raspail.

L'Hôpital-Ydes (Cantal). D : Hippolyte Froger.

Montendre (Charente-Maritime). D : F-ino G. Perrier,
"Petit Moulin".

Reims (Marne). D : A. Albault, 49 Battesti.

Roussillon (Vaucluse). D : G. C. Gézéqué, La Fraternité
Spirituelle, Les Marquets. Tel : 8.

St. Ouen-l'Aumône (S. et O.). D : A. Tribouillard,
4 Avenue Jules César. Tel : 582 Gontoise.

Sancoins (Cher). D : R. Blanc, Ecole M. Audoux.

Sin-le-Noble (Nord). D : J. Goulois, 48 bis, Rue Henri
Lemette.

Germanujo

Driedorf. FD (Ferioj) : Karl Karger, (16) Driedorf über
Herborn/Dill.

Göttingen. D : D-ro S. Engler, 27 Gartenstr., (20b)
Göttingen, Niedersachsen.

FD (Filatelo) : R. Eichholz, Bünne 19, (20b) Grone-
Göttingen.

FD (Komerco) : La D.

FD (Universitataj aferoj) : D-ro F. Jesse, Barfüsserstr.
15.

FD (Urbaj aferoj) : H. Köhne, Egelsberg 14.

Hungarujo

Ujkigyós. D : Pastro A. Lantos-Kiss, Ujkigyós, Békés m.

Irlando

Dublin. FD (Ŝakludo) : F.R.A. McCormick, 49 White-
beam Road, Clonskeagh. Tel : 92827.

Italujo

Roma. FD (Lingvoj) : V. Musella, Via Sacconi 4.
Tel : 394.163.

Varazze. VD : A. Puppo, Piazza Sant' Ambrogio 4.
FD (Turismo) : La VD.

Kanariaj Insuloj

La Laguna. FD (Stud. ntaj aferoj) : L. Cobiella Cuevas,
San José 7, Santa Cruz de la Palma.

Madejro

Funchal. FD (Medicino) : D-ro J. C. Travares da Silva,
Rua do Aljube 49-I. Tel : 972.

Nederlando

Rotterdam. FD (Filatelo) : P.M. den Toonder, Clingen-
daal 8, Rotterdam-Z. Tel : 23480.

Veendam. FD (Propagando) : U. W. Wiers, Beneden
Oosterdiep 13. Tel : 212.

Norvegujo

Bergen. FD (Instruado) : S-ino E. Matland, Kvam,
Nygårdsvik pr. Bergen.

Polujo

Jelenia Gôra. FD (Propagando) : J. Garbar, Skr.
poczt. 141.

Portugalujo

Lisboa. FD (Medicino) : D-ro S. Rocha Homem, Rua
de D. Estefânia 24 r/c.

Svedujo

Fensbol. FD (Komerco) : Helge V. Sandén. Tel : 32.

Halmstad. D : J. M. Ahlström, Erik Dahlbergsgatan 16.
Tel : 2727.

FD (Komerco) : G. Tengling, Gymnasiegatan 18.
Tel : 4392.

FD (Oficistaj aferoj) : A. Andersson, Stålgatan 5. Tel :
2643.

Karlskoga. FD (PTT) : A. E. Ekelund, Postvillan,
Bofors. Tel : Kga 33176.

Kinnared. D : Oskar Sandkvist, instruisto.

Norrköping. FD (Fervojoj) : S. E. Ragnar, Odalgatan
20 B. Tel : 26376.

Skövde. FD (Natur-scienco) : C. E. Grahm, Nygatan 6.
Tel : 2636.

Usono

New Auburn. D : Karl Froding, Route 1, New Auburn,
Wis.

ŜANĜOJ

Aŭstralio

Melbourne. FD (Fotografado ; Junularo) : vakas.

Britujo

Deal. D : vakas.

Hungarujo

Budapest. FD (Scienco) : nova adreso : Fö utca 37/6,
Budapest II.

Italujo

Genova. VD : nova adreso : Banca Commerciale Italiana,
Via 25 Aprile.

Nederlando

Arnhem. FD (ŝufarado) : nova adreso : Jacob Cremer-
straat 39.

Usono

Rockford. D : vakas.

PATRONOJ 1948.

21. S-ro P. H. Lewis, Didcot, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948.

292. S-ro M. Moindrot, Domery par Rians, Francujo.

293. S-ro M. Pokrzywa-Pokzrycki, Poznan, Polujo.

294. S-ro J. Dastych, Chelмна, Polujo.

295. S-ro B. Klensporf, Poznan, Polujo.

296. S-ro J. Krzyzanowski, Lodz, Polujo.

297. S-ro P. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo.

298. S-ro J. Garbar, Jelenia Gora, Polujo.
 299. S-ro S. Klytides, Nicosia, Cipro.
 300. S-ro W. Morris, Birmingham, Anglujo.
 301. S-ro R. Redhead, Victoria, B.C., Kanado.
 302. S-ro F. H. Bereterbide, Buenos Aires, Argentino.
 303. S-ino E. Hanks, Melbourne, Aŭstralio.
 304. S-ro E. Hanks, Melbourne, Aŭstralio.
 305. S-ro M. Tuch, Katowice, Polujo.
 306. S-ro T. Gryczko, Warszawa, Polujo.

DONACOJ al la ĝenerala kaso: B. McGrath 5ŝ., Wm. H. Gix 10ŝ., F-ino K. Wood 5ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Aprilo 1948, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1947:

	1947	1948
Asociaj membroj ..	5412	5264
Individuaj membroj:		
MJ	822	702
MA	4305	3902
MS	260	306
Patronoj ..	22	21
DM	110	163
HM	20	55
	5539	5149
	10951	10413

Grave. Dum la kongresa periodo la sekretario ne deĵoros en Rickmansworth. Oni do bonvolu klopodi, ke korespondaĵoj ne atingu la oficejon dum tiu tempo. Antaŭdankon.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*

ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

19. La esperantlingvaj radiodissendoj havas grandan propagandvaloron, fakto, kiun la esperantistaro ankoraŭ ne povis eluzi. Precipe nun, kiam la vojaĝebloj estas tre limigitaj, ni devas uzi tiun plej signifan, modernan propagandilon.

20. Samideanoj, organizu la grupan aŭskulton de Esperantlingvaj radiodissendoj, ĉu en privataj loĝejoj, ĉu en kluboj, k.s. Invitu tien konatojn neesperantistajn kaj tuj traduku al ili la dissendon. Poste laŭeble skribu poŝtkarton al la koncerna stacio kaj igu la ĉeestantojn subskribi ĝin.

21. La novaĵojn eksciitajn el Esperanta dissendo oni rakontu al multaj personoj, menciante ke la novaĵo venis de franca, hungara, ĉeĥa, sveda, brazila k.t.p. Esperantlingva dissendo. Se eble, proponu la liveron de tiaj novaĵoj al iu nacilingva gazeto.

22. La Esperantaj asocioj alvoku siajn membrojn por la ĉi-supra agado. Aranĝu premiotajn konkursojn inter la membroj, ekzemple pri difinita periodo en kiu oni kalkulas kiu aŭskultis la plej multajn dissendojn kun la plej multaj aŭskultantoj. Petu la radiogazetojn, ke ili aparte grupigu en la aperontaj radioprogramoj la Esperantajn dissendojn.

23. La kompilantoj de Esperantaj dissendoj klopodu dissendi originalaĵojn. Tio povas esti ĉia interesa bagatelo (politika, arta, scienca, sporta, k.s.) kiun oni ankoraŭ ne dissendis alilingve.

VARBU VIAJN AMIKOJN !

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15–17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérartistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00–21.15	Praha. 31.41m. P.
Dimanĉo	15.00–15.15	Sveda Radio. 19.80m. kaj 27.83m. I. pri la 33a Universala Kongreso. (Nur la unuan Dimanĉon de la monato)
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	17.30–17.40	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	21.00–21.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato).
	23.30–23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45–21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	17.45–18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	13.00–?	München. 405m. kaj 48.70m., kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevo.

ESPERANTISTA FERIO EN NORVEGUJO

Gesamideanoj, ni invitas vin al unusemajna ferio de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto en Lofthus, Hardanger.

Jen vi havas ŝancon vidi la plej belan regionon en okcidenta Norvegujo. La restadejo situas kiel perlo ĉe la bela Hardangerfjordo, unu el tiuj mondfamaj fjordoj kiuj estas tiel tipaj por Norvegujo. Kaj ĉirkaŭ tiu perlo ĉe la bela fjordo leviĝas la montaro kun eterna glaciejo kaj altaj akvofaloj. Venu vidi per propraj okuloj!

Petu prospekton aŭ anoncu vin tuj, se vi deziras kunesti. Ni havas lokon por nur 50 personoj. La prezo estas n. kr. 125.00 kaj kovras ĉiujn kostojn dum la restada semajno.

Adreso: Esperantista ferio,
Postkasto 132, Haugesund, Norvegujo.

ĈU VI IROS AL MALMÖ?

Se jes, vojaĝu iom pli frue por ĉeesti la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør (Elsinoro), Danlando, nur 3 horojn de Malmö. Kurstempo: 17–24 kaj 24–31 de julio. Tie vi ekhavos bonegan lingvan ekzercon antaŭ la kongreso.

Prospekto havebla ĉe

S-RO L. FRIIS,
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Ĉu vi jam legis la problem-romanon,

D-ro DORNER?

Se ne, aĉetu kaj legu ĝin nun!! Ĉie oni pridiskutas ĝiajn problemojn!! Partoprenu ankaŭ vi la pridiskuton!

“... la verko estas interesa kaj vigla... Nur fakulo estas kompetenta kritiki la sciencan bazon de la verko... —*Esperanto Internacia*.

“... Rimarkinda verko pri arta gravedigo... ”

... La aŭtoro evidente posedas tute sufiĉan fantazieron de romanverkisto—eĉ pli ol sufiĉan—tiel streĉe kaj romantike li scias gvidi la temon...

... se la libro aperus en nacia traduko, ĝi certe estus al sia eldononto brila sukceso.—

Suomen Socialdemokratti.

Broŝ. 8 ŝil., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

S. GRENKAMP

Oficiala Vortaro de Esperanto

Jen vortaro de la oficialaj radikoj kun klaraj, koncizaj difinoj en Esperanto.

Poŝformata, bele presita kaj bindita.
248 paĝoj.

Prezo: 2 ŝil. 3p., aŭfranko 3p.
(10 rpk. aŭfrankite).

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo.



Tatra

TATRA—ŝaŭmigilo, la pulvoro, el kiu vi facile, simple kaj tuj preparos bongustan, dolĉan, ŝaŭmetantan TRINKKLIMONADON. Mendu skatolon, kiu enhavas 35 porciojn kun recepto en Esperanto. Kontraŭ antaŭpago 15 rpk. aŭ egalvaloro ekspedas ĝin rekomendite:

JAROMÍR PAVLACKÝ

Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Se vi deziras pagi aliamaniere (per Esperantaj libroj, varoj, k.t.p.), petu senpagan prospekton. Liverebla en la tuta mondo. (Nur en Germanujo mi ne havas provizore liverpermeson).

LIBRO EL ĈINUJO

ELEKTITAJ NOVELOJ

de
LU SIN

Broŝurita 140 paĝoj.
Prezo 3 ŝil., afranko 3p. (13 rpk.)

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj - Vortludoj
Preseraroj - Anekdotoj
Matematikaĵoj - Rimaĵoj
Societludoj - Demandaro
Konsiloj por Grupestroj
kaj Kursgvidantoj.

Prezo :
1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1p.
aŭ 5 int. rpk. afrankite.

Eldonita de
ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.
Mendu ĉe U.E.A.

SIMPLAJ LEGOLIBROJ

ESPERANTO POR INFANOJ. G. GLADSTONE SOLOMON.

Ilustrita. Broŝurita 70 paĝoj.
Prezo 1 ŝil. 11 pencoj afrankite (8 rpk.)

JOHANO KAJ SILVIO. F. F. BETTS.

Broŝurita 48 paĝoj.
Prezo 1 ŝil. 2 pencoj afrankite (5 rpk.)

TEJO KAJ ĈERIK. H. G. TOMS.

Broŝurita 48 paĝoj.
Prezo 1 ŝil. 8 pencoj afrankite (7 rpk.)

Eldonitaj de
THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo